



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 39/76 - 4 okt 1976

Aperas ĉiusemajne

Abonu

Pilo-Press

E N D

Eŭropan Esperanto

Revuon !

Abonkotizo por

ĉiuj tri: 50,- GM (Vidu sur p. 4!)

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg

Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

Rekorda kongreso en Italujo

Preskaŭ 700 kongresanoj el 19 landoj

Massa - Hodiaŭ ni volas doni, pli ol kronikon, kelkajn impresojn pri la 47-a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta en Massa de la 18-a ĝis la 24-a de septembro, kiu estis vere rekorda koncerne nombron de partoprenintoj (preskaŭ 700 el 19 landoj), subtenon flanke de la aŭtoritatuloj kaj reeĥon en la gazetaro kaj ĉe la publiko.

Massa, situanta ĉe la nord-okcidenta ekstremo de Toskanio, ĉe la limo kun Ligurio kaj Emilio, havas brilan tradicion: dum longa tempo ĝi eĉ estis ĉefurbo, kvankam de nura princlando, kaj tio speguliĝas en pluraj dignoplenaj konstruaĵoj. Renkontiĝejo de kulturoj diverse devenaj, Massa estas kapabla je grandaj kaj obstinaj luktoj, sed ankaŭ je pacaj sentoj kaj sindonemo: ĉi tie, sur la Apuana montaro, okazis unu el la plej akraj epizodoj de la popola rezisto kontraŭ la germanaj okupantoj, sed, post la milito, Massa ĝemeliĝis ĝuste kun germanurbo (Bad Kissingen). Simpla monteto dividas Massa-on de Carrara; ambaŭ urboj, preskaŭ samloĝataj (entute 130 mil homoj) kune formas unu solan provincan ĉefurbon, kiu dum kelka tempo eĉ havis unu solan nomon (Apuania): sed preskaŭ tuj oni devis denove disigi la du komunumojn, ĉar tro grandaj estas iliaj diferencoj, malgraŭ ilia apudeco, aŭ eble ĝuste pro ĝi. Sufiĉas pensi, ke Massa estas kvazaŭ "blanka" (kristandemokrata) insulo en Toskanio ĝenerale "ruĝa" (socialisma/komunisma), dum Carrara estas eĉ la itala loko, kie plej multe floras la anarkiisma movado, kiu havas, surloke, rimarkindan politikan pezon (oni devas memori, pri tio, ke la ĉefa industrio de Carrara estas la elfosado kaj la prilaborado de marmoro, tio signifas laboron malfacilan kaj pezan, en kiu la personaj kvalitoj ludas la ĉefan rolon).

En ĉi tiu lando tiel viva, estas preskaŭ nature, ke Esperanto-Kongreso ricevis favoran reeĥon, des pli ke la aranĝoj estis tre lerte kaj entuziasme organizitaj de loka komitato, sub la laŭdinda kaj senlaca gvidado de gefratoj Mario kaj Catina Dazzini.

Jam antaŭ la malfermo de la Kongreso, la du toskaniaj ĵurnaloj "La Nazione" el Florenco kaj "Il Telegrafo" el Livorno (en Massa mem ne aperas ĵurnaloj) amplekse anoncis la Esperanto-aranĝojn, ankaŭ kun fotoj, aparte emfazante la amasan partoprenon de germanaj esperantistoj el Bad Kissingen, kaj memorigante, ke siatempe la ĝemeliĝo okazis dank' al la perado de la esperantistoj el la du urboj (tiel, ke la oficiala medalo de la ĝemeliĝo surhavas skribaĵojn en Esperanto). Ankaŭ en la postaj tagoj, la menciitaj ĵurnaloj (samkiel aliaj, ekz. "Il Corriere d'Informazione" el Milano) amplekse raportis pri la eventoj de la kongreso kaj pri la agado de la esperantistoj en la diversaj kampoj, preskaŭ ĉiam kun fotoj. Por havi ideojn pri la interesiĝo, oni pensu, ke en "La Nazione" de 19.9.1976 aperis unu tuta paĝo pri Esperanto, kun artikoloj titolitaj "La kongreso de Esperanto ekde hodiaŭ en Massa", "L.L. Zamenhof, la elpensinto de la lingvo", "Esperanto en lernejo: kiam ankaŭ en Italujo?", "Nur unu monato por lerni ĝin", "La bondeziro de la urbestro", "La saluto de la Provinca Prezidanto", "Miloj da radio-elsendoj", "Seriozaj intencoj de la junulara grupo". Tri fotoj prezentis, respektive, la partoprenintojn de la Esperanto-kongreso okazinta en Massa ĝuste antaŭ 20 jaroj,

la buston de Zamenhof en la Kastelo Malaspina en Massa (sidejo de la Nacia Esperanto-Biblioteko), kaj la siatempan inaŭguron de "strato Esperanto" en Marina di Massa (pri tio, estas kurioze, ke dum en Massa oni emfazis, per la nomo "Esperanto" donita al iu strato, la ideon de internacia lingvo, en Carrara oni prefere substrekis la individoon, siatempe nomante placon laŭ "D-ro Zamenhof").

Temo de la ĉi-jara Itala Kongreso de Esperanto estis: "Esperanto en la lernejo por edukigo al internacieco", kaj ĉi tiu frazo resumas la celojn de la Itala Esperanto-movado, kiu en ĉi tiu momento streĉas siajn fortojn ĝuste por ke Esperanto oficiale eniru la lernejajn programojn. Jam preskaŭ forlasinte la vojon de la leĝpropono, kiu montrigis senfrukta, la italaj esperantistoj nun klopodas plene profiti la jam ekzistantajn leĝojn, aparte tiujn pri eksperimentado en la elementaj kaj mezgradaj lernejoj, danke al kiuj, ekzemple, de kelkaj jaroj okazas la elstara arango de Cesena (kie, en la elementa lernejo "Dante" en la kvartalo Oltrevasio, po 300 geknaboj lernas Esperanton en la kadro de la oficialaj programoj).

La eventoj, kiuj plejmulte impresis la ĝeneralan publikon, estis la Esperantlingva meso en la Katedralo, la inaŭguro en la Komunuma Teatro, la starigo de busto honore al Zamenhof, la folkloro spektaklo sur la ĉefa placo kaj dokumenta ekspozicio pri Esperanto en la Duka Palaco.

La meson kuncelebris 10 pastroj diverslandaj kaj monsinjoro Wladislaw Miziolek, help--episkopo de Varsovio, li mem esperantisto. La kongreson inaŭguris tuta aro da naciaj, regionaj, provincaj kaj lokaj aŭtoritatuloj (inter kiuj menciindas senatano Del Nero, kiu mem estas esperantisto), la vicprezidanto de la Regiona Konsilantaro, la Provinca Studestro kaj la Urbestro).

La buston en la Kastelo "Malaspina" inaŭguris, reprezentanto de la itala registaro, la vicministro pri agrikulturo, deputito Edoardo Speranza (kies nomo, pro kurioza hazardo, signifas ĝuste "Espero"!), en ĉeesto de la pola episkopo kaj de la sekretario de la Pola Ambasadorejo en Romo, d-ro Kosierkiewicz, kiu, en sia junaĝo, ankaŭ ek-lernis Esperanton); estas substrekinde, ke la vicministro kaj la diplomato speciale veturis por la okazo de Romo al Massa (preskaŭ 400 km). Sur la ĉefa placo, kie fruktodonas orango-arboj (tiel milda estas la klimato en Massa!), folkloro grupo el la toskania vilaĝo Querceta prezentis plaĉan spektaklon per svingado de flagoj kun Esperantostelo. En la Duka Palaco, en la prestiĝa "Salonego de la Svisoj", kie ankaŭ okazis la kongresa balo, dum pluraj tagoj ampleksa ekspozicio informis la publikon pri la historio kaj la nuntempa stato de la Esperanto-movado.

En la tuta urbo, afiŝoj, tolstrioj kaj paneloj anoncadis kaj bonvenigis la Kongreson. La kongresanoj ĝuis senpagan veturadon sur la urbaj trafikiloj, tie ĉi ke, dum la kongresa senaĵo, ne estis malofte vidi neesperantistojn...kun Esperanto-insignoj!

Dum du tagoj funkciis porokaza poŝt-oficejo, kiu uzis specialan poŝto-stampojn kun mencio de la kongreso kaj bela bildo de urba monumento. (Ekzemplerojn oni povas aĉeti ĉe d-ro Antonio De Salvo, C.P. 4017, I-00100 Roma Appio, kontraŭ po 2 respondkuponoj inkluzive de sendkostoj!)

La Komunumo de Massa eldonis oficialan medalon el bronzo, memore al la inaŭguro de la busto de Zamenhof. La medalo, en tre limigita eldonkvanto, estas ricevebla kontraŭ donaco por la funkciado de la Nacia Esperanto-Biblioteko, C.P. 22, I-54100 Massa C., Italujo.

Laŭ Radio Roma, teksto de Antonio De Salvo

ROMOLO kun la naturamikoj

Darmstadt. La scenejo por semajnfina renkontiĝo (1-a - 3-a de oktobro), al kiu komune invitis ROMOLO kaj la heslandaj naturamikoj esperantistaj, estis la naturamika domo de Dieburg "Am Mainzer Berg". Temis pri "familia renkontiĝo" kaj fakte dekdio da infanoj ludantaj svarmis inter la kortaj arboj, dum diligentaj virinoj (s-inoj Führer, Hingelbein kaj Woite) verve okupiĝis en la kuirejo por prizorgi la nutradon, kiu inkluzivis kvin mangojn por 30 - 40 personoj! Ne mankis la librostando de PĪLO, kie vendadis s-ino Hofmann.

La ROMOLO-ĉefkunveno komenciĝis sabatmatene per saluto kaj raporto fare de la sekretariino Elisabeth Ritterspach, kiu devis anstataŭi kaj la prezidanton Robert Kvasnak kaj la vicprezidanton Bernt Winter. Post kasista kaj kasrevizora raportoj necesis elekti novan vicprezidanton, ĉar la ĝisnuna pro sia sanstato devis demisii. La oficon transprenis Gernot Ritterspach, por la ceteraj estraranoj la dujara oficperiodo daŭras ĝis venonta jaro. Sekvis diversaj raportoj el la grupoj, kaj Eckie Woite provokis viglan diskutadon pro la instigo, ke ROMOLO en printempo 1977 sekvu la agadon de Darmstadt kaj Offenbach serĉi kontakton kun politikaj partioj; la balotoj por Eŭropa Parlamento donus bonvenan kaŭzon denove prezenti la utilecon de nia lingvo sur tiu kampo. La grupoj Wiesbaden kaj Mainz estis petataj palpi la terenon. Honora dokumento pro fideleco al Esperanto dum pli ol 50 jaroj estis transdonita al Bernhard Zenker (vidu apartan raporton!).

La proksimeco de la famkonata "fosejo Messel" instigis la organizintojn inviti la fakulon d-ron Höllwarth, kiu donis koncizan sed interesan superrigardon pri la estigo de la fosejo antaŭ 50 milionoj da jaroj, pri ĝia geologia kaj arkeologia signifoj (fosilioj), la ekspluatado mineja ĝis la hodiaŭa problemaro "rubaj-deponejo".

Impresojn pri la Universala Kongreso en Ateno kaj la postkongresa ŝipkrozado donis kolora sonfilmo en Esperanto de Wilhelm Barnickel. La interesemaj spaktantoj danke aplaudis poste ambaŭ prezentoj.

Posttagmeze kunvenis la naturamikoj esperantistaj por sondi la laboreblecojn sur tutfederacia nivelo. Oni konfirmis Manfred Führer kiel heslandan fakgrupestron kaj elektis Eckie Woite kiel komitatano. Vespera finpunkto de tiu harmonia tago estis tri kolorfilmoj pri kanusporto sur torrentoj, kaj dimanĉmatene oni invitis al arbara migrado ĝis la fosejo Messel.

Elisabeth Ritterspach

Honorigo por Bernhard Zenker

En la kadro de la ROMOLO-ĉefkunveno, la 2-an de oktobro 1976, s-ro Bernhard Zenker, Hanau, estis honorigata pro pli ol 50-jara membreco al GEA. Li esperantistiĝis en la jaro 1920, prezidis dum la jaroj 1933 - 1936 la Esperanto-grupon Breslau kaj samtempe la Silezian Ligon Esperantistan. Post la milito li tuj denove ekaktivis en Schweinfurt, kie li gvidis la lokan Esperanto-grupon. En GEA li prizorgis longtempe la rilatojn al gazeto kaj radiostacioj. De 1953 - 1974 li estis prezidanto kaj senlaca motoro de ROMOLO, kies Honora Prezidanto li ankoraŭ hodiaŭ estas. Komprenable li de multaj jaroj troviĝas en la listo de UEA-delegitoj, sed ke li tradukis sub la pseudonimo "Bozo" multajn modkantojn estas eble ne tiel konate. Koran gratulon, kara Bernhard Zenker!

37-a Kongreso de I.K.U.E.

Romo/Ĉenstoŭova (pp) - La 37-a Kongreso de I.K.U.E. (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) okazos de la 17-a ĝis la 21-a de aŭgusto 1977 en Ĉenstoŭova, Pollando. Aligiloj kaj informoj estas haveblaj de Centra Oficejo de I.K.U.E., str. F. Berni 9, I-00185 Roma, Italio. Informojn en Pollando donas la Animzorganto de Polaj Esperantistoj, Sac. Dro Romano Forycycki, str. Kilinskiego 20, PL-05-850 Ożarów k/W-wy.

Propra domo por esperantistoj

Hamburg (pp) - Ekde la 1-a de oktobro 1976 la esperantistoj de Hamburg havas propran domon. Ĝi situas en la urboparto Langfelde. La preciza adreso estas: Vehrenkampstr. 15-17, 2000 Hamburg 54.

Infanfesto en Paderborn

Paderborn (pp) - Por la infanoj, kiuj nun lernas Esperanton, la Eŭropa-Klubo planas feston sub libera ĉielo por la venonta dimanĉo, la 10-an de oktobro, de la 14-a ĝis 18-a horo. S-ro Behrmann taksas, ke venos 400 infanoj.

Anonco pri Eŭropa Esperanto-Revuo

Ekde la 1-a de januaro 1977 Eŭropa Esperanto-Revuo ne plu estos organo por la membroj de Germana Esperanto-Asocio. La koncerna kontrakto inter la estraro de Germana Esperanto-Asocio kaj Eldonejo Ludwig Pickel estas nuligita.

La membroj de Germana Esperanto-Asocio ne plu ricevos la revuon ekde 1977. Kiu el tiuj membroj volas legi la revuon ankaŭ estonte, devos ĝin aparte aboni. La abonkotizo estas 16,- GM kaj pagota nur al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Postĉekkonto Nürnberg 819 56-851 aŭ Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579.

Eŭropa Esperanto-Revuo ankaŭ estonte raportos pri la Esperanto-vivo en Germanio kadre de la redakcia programo.

Antaŭ kelkaj tagoj aperis n-ro 4/76 de EER. Kompreneble ĉiuj membroj de GEA ricevos ĉiujn restajn numerojn de 1976.

Abonu la Pilo-Eldonaĵojn: Pilo-Press (esperanta eldono), Esperanto-Nachrichten-Dienst (END) kaj Eŭropa Esperanto-Revuo. Ĉiuj tri eldonaĵoj kune kostas por 1 jaro 50,- GM!

Esperanto en Radio

Varsovio. En la monato septembro la Esperanto-redakcio ricevis preskaŭ 500 korespondaĵojn de aŭskultantoj, en la lasta semajno pli ol 160. Interesa kaj ĝojiga estas la fakto, ke nun ankaŭ el okcidentaj landoj troviĝas aŭskultantoj kiuj rangas sur la pintaj lokoj de la statistiko. - La diskuto pri la leterkesto daŭras; ŝajnas, ke nun ĉi-tiu programero iom post iom trovas sian definitivan formon, sed tio dependas de la aŭskultantoj kaj pri ilia skribmaniero kaj speciale de novaj aktivaj aŭskultantoj. Tamen por ke ne ekestu miskompreno: Programeron kiel la leterkeston oni ne povas fiksi en antaŭplanitan skemon, ĝi ja estas la forumo de la aŭskultantoj!

La lasta Esperanto-Ekspreso donis denove ionote da poezio kaj kantojn de "Niaj bardoj". Certe estus salutinde aŭdi pli ofte ion de propra Esperanto-kulturo! A. Pettyn intervjuis Lajos Niederfriniger el Budapeŝto, kiu kiel laŭreato de Konkurso de Pola Radio partoprenis la ekskurson tra Norda Pollando.

Vieno. En unu el la pasintaj elsendoj la Esperanto-redakcio de ORF disaŭdigis ankaŭ artikolon pri "Kardinalo D-ro Franz König - 20 jarojn ĉefepiskopo de Vieno" verkitan originale de Walter Mudrak. El tiu artikolo ni citas: "Kardinalo König estas fakte ankaŭ nomata kelkfoje kvazaŭ vojaĝisto por la eklezio". Malgraŭ tio kaj krom lia signifa laboro kiel fama scienculo li volas esti, kaj estas, unuavice la animzorganto de sia diocezo, kvankam laŭ propra stilo, kaj gvidanto al interno, efikanta al spirito kaj animo; same li estas konstruanto de pontoj ekzemple intersocia, serĉinta la interparolon kun la sindikatoj kaj ekonomio-reprezentantoj. Li certe estas unu el la plej elstaraj, vere gvidaj eminentaj nuntempaj ekleziuloj...."